La 97-a UK
HANOJO – VJETNAMIO

# 97-a Universala Kongreso de Esperanto

Hanojo, 28 julio – 4 aŭgusto 2012

# DUA BULTENO



Kongresa temo

**Esperanto — ponto al paco, amikeco kaj disvolviĝo**

# Enhavo


Loka Kongresa Komitato ........ interna frontkovrilo
Por eniri la landon ........ 2
Utilaj informoj pri Hanojo kaj Vjetnamio ........ 3
Loĝado en Hanojo ........ 5
  Hoteloj ........ 6
Antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj ........ 8
  Antaŭkongresa ekskurso ........ 9
  Postkongresaj ekskursoj ........ 10
Dumkongresaj ekskursoj ........ 14
  Tuttagaj ekskursoj ........ 14
  Duontagaj ekskursoj ........ 16
  Semajna skemo de ekskursoj ........ 18
Bankedo ........ 19
Provizora programo ........ 20
Programeroj dum UK ........ 21
Kiu kongresas kiam kaj kie? ........ 22
Ĝeneralaj informoj ........ 22
Kontaktinformoj ........ 24
Kongresaj perantoj ........ interna dorskovrilo


*Kovrilo: detalo de Halong-golfeto, naturheredaĵo de Unesko.*

## Loka Kongresa Komitato

| | | |
|---|---|---|
| Prezidanto, programo | - | NGUYEN Van Loi |
| Vicprezidanto, fakaj kunsidoj | - | HOANG Ngoc Boi |
| Vicprezidantino, eksteraj rilatoj, vizoj | - | NGUYEN Thi Phuong Mai |
| Vicprezidanto, artaj aranĝoj | - | TRAN Quan Ngoc |
| Loĝigo | - | LUONG Ngoc Bao |
| Veturado | - | THIEU Quang Dieu |
| Kongresejo | - | NGUYEN Van Ha |
| Giĉeto | - | TRINH Hong Hanh |
| Kasisto | - | PHAM Mai Lan |
| Kongresa Kuriero, blindulaj aranĝoj | - | NGUYEN Thi Ngoc Lan |
| Infana Kongreseto | - | LAI Thi Hai Ly |
| Helpantoj | - | NGUYEN Thi Thom Thom |
| Gazetara servo, informado | - | NGUYEN Xuan Thu |
| Ekskursoj | - | LE Thi Thien Thu |
| Sana servo | - | NGUYEN Van Vinh |
| Bonveniga servo, junulara programo | - | NGUYEN Hoang Yen |

97-a Universala Kongreso de Esperanto

# DUA BULTENO

Hanojo

28 julio–4 aŭgusto 2012

# Por eniri la landon

**Ĝenerale**. Bonvolu noti, ke la reguloj pri vizdonado malsamas laŭ landoj, kaj ke ili konstante ŝanĝiĝas. Tial bv. nepre mem kontroli ĉe la plej proksima vjetnama diplomatia reprezentejo (bv. mem trovi ties adreson en via ĉefurbo aŭ najbara lando), ĉu vi devas havi vizon kaj sub kiuj kondiĉoj. UEA/LKK ne povos helpi pri vizpetoj faritaj post la 1-a de majo 2012, kaj principe ne povos respondi al tiuj petoj. Civitanoj de i.a. Danio, Finnlando, Japanio, Koreio, Norvegio kaj Svedio, kiuj restos malpli ol 15 tagojn ne bezonas havi vizon por eniri Vjetnamion. Ankaŭ civitanoj de i.a. Indonezio, Laoso kaj Malajzio, kiuj ne restos pli ol 30 tagojn ne bezonas vizon.

**Dokumentoj**. Ĉiu vizitanto devas posedi pasporton validan minimume ses monatojn post la alvendato, koncernan vizon, samkiel revenbileton. La kongresanoj mem devas zorgi pri la akiro de vizoj. En escepte komplikaj kazoj oni povas peti helpon de UEA/LKK.

**Konfirmiloj kaj invitleteroj**. Normale la Kongresa Konfirmilo devus sufiĉi por pruvi la kongresanecon al la vizdona instanco. La konsulejoj povas postuli oficialan invitleteron, kiun UEA sendos se oni petas ĝin. Al nealiĝintoj oni ne povas sendi invitleterojn nek aliajn konfirmaĵojn. Bv. konscii, ke nek UEA nek LKK povas influi la decidojn de la konsulejoj.

**Datoj**. Bv. noti, ke la invitletero povas teksti nur por la periodo de la oficiala kongresdaŭro (28 julio–4 aŭgusto, eventuale plus daŭro de menditaj antaŭ-kaj/aŭ postkongresoj). Se vi bezonas pli longan restadon, tion vi devas aranĝi private.

**Mongarantioj**. Senkonsidere ĉu oni havas aŭ ne la vizon, necesas pruvi ĉe la eniro en la landon, ke oni posedas sufiĉajn monrimedojn por la restado. Al kongresanoj, kiuj mendis kaj pagis loĝadon pere de UEA (aŭ venas je aparta invito de UEA), oni povas sendi, se necese kaj laŭ peto, konfirmon pri la pagitaj servoj. Tio povas parte kompensi la postulon pri posedo de sufiĉaj monrimedoj. UEA kaj LKK ne donas financajn garantiojn al kongresanoj el nepagipovaj landoj. Kongresano mem devas pruvi al la vizdona instanco posedon de sufiĉaj rimedoj por restado en la kongresa lando.

**Asekuro**. Unu el la postuloj por ricevi vizon estas akiro de asekuro, pri kio la kongresanoj zorgu mem. Ofte tute taŭga asekuro estas aĉetebla en flughavenoj. Sendepende de tio, ĉu necesas havi vizon aŭ ne, ĉiu kongresano prefere asekuru sin por la daŭro de la vojaĝo kaj restado.

**Plur-enira vizo.** Se oni planas reveni al Vjetnamio post ekskurso al alia/najbara lando, tiuj, kiuj bezonas ĝin devos havi alian vizon por re-eniri la landon. En tiu kazo pli konvenas dekomence peti plur-eniran vizon.

# Utilaj informoj pri Hanojo kaj Vjetnamio

**Situo**: Vjetnamio situas en la orienta parto de la hindoĉina duoninsulo. Ĝin limas Ĉinio en la nordo, Kamboĝo en la okcidento, kaj la Sud-ĉina Maro en la oriento kaj sudo.

**Loĝantaro**: Vjetnamio havas ĉ. 85 800 000 loĝantojn.

**Ĉefurbo**: Hanojo.

**Klimato**: Vjetnamio ricevas du musonojn: la vintra musono, de oktobro ĝis marto, kun pluvegoj kaj malaltaj temperaturoj, ĉefe en la montara regiono, kie povas neĝi; kaj la somera musono, de aprilo ĝis oktobro, kiu kunportas varman kaj humidan veteron.

**Politika divido kaj geografio**: Vjetnamio estas dividita en 58 provincoj kaj 5 grandaj urboj. Tri kvaronoj de la lando konsistas el montoj kaj montetoj.

**Lingvoj:** La vjetnama estas la sola oficiala lingvo. Multaj kapablas paroli angle kaj, ĉefe pli aĝaj homoj, france.

**Loka tempo**: UTC +7 horoj.

**Elektro**: La elektra tensio estas 220-volta. Ekzistas tri malsamaj kontaktiloj: du plataj paralelaj kontaktiloj, du rondaj kontaktiloj, kaj du plataj en linio kun unu grunda kontaktilo.

**Interreto**: Interret-kafejoj troviĝas en diversaj grandaj urboj en la lando. Pluraj hoteloj proponas al siaj gastoj sendratan aŭ dratan interretkonekton, sed ne ĉiam senpage.

**Telefonado**: La prefikso por voki al Vjetnamio estas +84. Por voki de Vjetnamio eksterlanden elektu 00 + landokodo + telefonnumero. Telefonado el hoteloj povas esti pli kosta ol telefoni el poŝtaj oficejoj aŭ telefonbudoj. Vjetnamaj SIM-kartoj por porteblaj telefonoj (la tarifoj por telefoni estas malaltaj) aĉeteblas kontraŭ favoraj prezoj en kioskoj, ankaŭ en la flughaveno.

**Gravaj telefonnumeroj**: Polico 113, fajrobrigado 114 kaj ambulanco 115.

**Laborhoroj**: Butikoj kutime estas malfermitaj de la 8h00 ĝis la 21h00, kelkaj eĉ ĝis la 22h00. Bankoj funkcias de la 7h30 ĝis la 11h30 kaj de la 13h00 ĝis la 16h30 de lundo ĝis vendredo; kelkaj funkcias ankaŭ en la sabata mateno, de la 8h00 ĝis la 11h30. Registaraj agentejoj laboras de la 7h30 ĝis la 16h00 kun unuhora paŭzo tagmeze, de lundo ĝis vendredo.

**Medikamentoj**: Apotekoj troveblas en preskaŭ ĉiuj ĉefstratoj de la grandaj urboj. Se vi bezonas specialan medikamenton estas pli bone mem kunporti, ĉar alie povas esti malfacile aŭ neeble trovi ĝin.

**Vakcinado**: La sola postulo pri vakcinado por eniri Vjetnamion estas kontraŭ la flava febro, sed nur se vi vizitis landojn kun tiu malsano (kelkaj el Afriko kaj Sudameriko) en la lastaj ses tagoj antaŭ la eniro en Vjetnamion.

**Sanservoj**: Neniam vojaĝu sen sanasekuro! En ekstremaj kazoj, tamen maloftaj, estas necese flugigi la malsanulon al pli grandaj urboj de la regiono, kiel Bankoko aŭ Honkongo, kiuj havas pli bone ekipitajn hospitalojn. UEA ne respondecas pri asekuro de kongresanoj.

**Mono**: La oficiala mono estas la vjetnama dongo (VND). Ĝi estas dividita en monbiletoj de 500 000, 200 000, 100 000, 50 000, 20 000, 10 000, 5 000, 2 000, 1 000 kaj 500 VND. Moneroj (5 000, 2 000, 1 000 kaj 500) ne plu cirkulas pro inflacio. Fremdaj valutoj kaj vojaĝĉekoj povas esti ŝanĝitaj en bankoj kaj monŝanĝejoj. Ankaŭ eblas preni monon el bankaj monmaŝinoj uzante debet- kaj kreditkartojn. Kreditkartoj estas akceptataj en multaj lokoj de grandaj urboj. Ne estas permesite kunpreni vjetnamajn dongojn eksterlanden. En la flughavenoj estas monŝanĝejoj, kie eblas aĉeti eksterlandajn valutojn antaŭ ol forlasi la landon.

**Sekureco**: Hanojo estas sufiĉe sekura, sed kiel en aliaj ĉefurboj ekzistas zonoj/lokoj malsekuraj vespere kaj nokte. Ĉiam atentu pri viaj posedaĵoj.

**Trinkakvo**: La kran-akvo ne estas bona por trinkado. Ĉiam boligu la akvon aŭ aĉetu enboteligitan akvon (bv. kontroli ĉu la sigelo estas sendifekta, ne antaŭe malfermita). Enboteligitaj (gas-)trinkaĵoj, kafo kaj teo estas bonaj por konsumi.

**Transporto de la flughaveno al la kongresejo**: El la internacia flughaveno Noi Bai (HAN), 45 km de la urbocentro, estas diversaj transportiloj al la urbo.
– Flughavena publika taksio: VND 210 000, proks. 30 minutoj. Aranĝeblaj en la flughaveno.
– Minibuso: po 2 USD persone ĝis la oficejo de Vietnam Airlines ĉe Quang Trung-strato, urbocentre. La minibuso ekiras kiam ĝi pleniĝas.
– Publika buso: la urbaj buslinioj 7 (ĝis la busstacio Kim Ma) kaj 17 (ĝis la busstacio Long Bien) ligas la flughavenon kun la urbo je ĉiuj 15-20 minutoj, de la 5h00 ĝis la 22h00. La haltejo estas dekstre de la flughavena elirejo. La vojaĝo kostas po 5 000 VND persone kaj daŭras ĉirkaŭ unu horon.
– Specialaj busoj por kongresanoj kiuj mendas hotelon pere de UEA kostas po 8 EUR persone.



# Loĝado en Hanojo

**Ĝeneralaj kondiĉoj de mendoj:** La kondiĉoj de mendoj kaj malmendoj estas priskribitaj dorsflanke de la mendilo kaj plurloke en la Dua Bulteno. Mendante, ĉiu kongresano akceptas tiujn kondiĉojn. Bv. nepre legi ilin antaŭ ol plenigi kaj sendi vian mendilon.

**Loĝado:** Kiel unuan loĝdaton oni kalkulas la daton de la alveno al la hotelo (ekloĝo); se oni venas iam post noktomezo, kalkuliĝas la dato de la antaŭa tago. Kiel lastan daton oni kalkulas la daton de la forlaso de la hotelo (foriro; do, la daton de la lasta mateno en la hotelo).

**Eniro kaj eliro:** Principe, eblas okupi ĉambrojn post la tagmezo de la mendita dato, kaj necesas forlasi la ĉambrojn antaŭ la tagmezo de la lasta tago. Se vi ne okupas ĉambron dum la unua mendita tago, oni nuligas la rezervon kaj vi perdas la plenan pagitan sumon por la tuta restadperiodo!

**Dulitaj ĉambroj kaj hazarda kunloĝigo:** La loĝiga servo ne povas aranĝi hazardan kunloĝigon de nekonatoj, pro kio dulitajn ĉambrojn oni disponigas nur al duopoj kiuj anticipe interkonsentis pri kunloĝado kaj menciis tion sur siaj mendiloj. Oni ĉiam fakturas la koston de plena ĉambro, eĉ se la kunloĝanto forestas dum iu(j) tago(j). Por faciligi al homoj kiuj nepre volas loĝi en dulitaj (aŭ plurlitaj) ĉambroj sed ne havas kunloĝanton, sur la retpaĝo de la kongreso (http://www.uea.org/kongresoj/uk_2012.html) troveblas anonctabulo por tiu celo.

**Frueco de la mendo kaj alternativaj mendoj:** Ĉar la mendeblaj kapacitoj ne estas senlimaj, kaj precipe ĉar la kongreso okazas dum la turisma sezono, gravas mendi kiel eble plej frue, kaj ne eblas garantii la plenumon de la originala mendo ĉiam laŭ la preciza deziro de la mendanto. Tial ĉe ĉiu mendo oni nepre menciu ankaŭ alternativajn loĝvariantojn. El la retpaĝo de la kongreso eblas scii, kiuj hoteloj jam estas plenaj.

**Pagoj:** La mendojn oni traktos nur post la ricevo de la koncerna pago.

**Ofertataj servoj:** Se ne estas menciite alie, la ĉambroj de la hoteloj havas klimatizilon, duŝejon (kelkaj ankaŭ bankuvon) kaj necesejon, kaj la prezo inkluzivas la matenmanĝon.

**Limdatoj:** La limdato por fari mendojn estas la 1-a de majo 2012. Mendojn post tiu dato oni plenumos nur escepte, ĝis la 1-a de junio, kaj nepre kontraŭ aparta krompago (40 eŭroj). Eblas malmendi nur ĝis la 25-a de majo 2012! Pri la ceteraj malmendaj reguloj konsultu la dorsflankon de la mendilo.

**Loĝkonfirmo:** Minimume unu monaton antaŭ la UK vi ricevos konfirmon pri via loĝado, kun detalaj informoj pri via hotelo kaj aliaj kongresaj gravaĵoj.

**La prezoj estas en eŭroj (EUR) por unu persono por unu nokto.** En la adresoj, la mallongigoj estas “str.” por strato kaj “dist.” por distrikto.


# Hoteloj

**1. Hotelo Melia Hanoi (5★)**
**44B Ly Thuong Kiet-str., Hoan Kiem-dist., Hanoi**



Kongreseja hotelo, luksa kaj centre lokita en la urbo. Ĉiuj ĉambroj havas i.a. klimatizilon, fridujeton, senpagan sendratan retan aliron en la akcepteja halo, sekurŝrankon, televidilon kun internaciaj televidkanaloj. Ĉiutage 2 senpagaj akvoboteloj en la ĉambro. La hotelo krome havas kafejojn kaj restoraciojn. Senpaga uzo de la gimnastikejo, saŭno kaj naĝejo. Ĉambroj kun "Reĝa Servo": krom la supraj servoj, ankaŭ ekskluziva en- kaj el-registriĝo en la hotelo ĉe la 20-a etaĝo; en ekskluziva restoracio estas proponata la matenmanĝo, posttagmeza teo kaj vesperaj manĝaĵetoj plus senlima servado de trinkaĵoj inter la 17h30 kaj 19h30; senpaga rapidlavado de vestaĵoj; senpaga uzo de Interreto ankaŭ en la ĉambro.
*Prezo en ĉambro: unupersona 117 EUR, dulita 68 EUR.*
*Prezo en ĉambro kun "Reĝa Servo": unupersona 175 EUR, dulita 99 EUR.*

**2. Hotelo Mercure (4★)**
**94 Ly Thuong Kiet-str., Hoan Kiem-dist., Hanoi**
800 metrojn de Melia Hanoi.



Moderna kaj renovigita hotelo kun gimnastikejo, kafejo kaj restoracio centre lokita tuj apud la centra trajnstacio de Hanojo. Sekurŝranko en la ĉambro. Kelkaj ĉambroj ekskluzive por ne-fumantoj. Sendrata interretkonekto kontraŭ pago.
*Prezo en ĉambro: unupersona 84 EUR, dulita 52 EUR.*


**3. Hotelo Hoabinh (3★)**
**27 Ly Thuong Kiet-str., Hoan Kiem-dist., Hanoi**
800 metrojn de Melia Hanoi.



La hotelo havas du ĉambrokategoriojn: normalan kaj luksan. La luksaj ĉambroj estas pli ampleksaj. En la ĉambroj estas televidilo, telefono, sekurŝranko. La matenmanĝo estas inkluzivigita kaj interretkonekto estas senpaga.
*Prezo en ĉambro: unupersona 56 EUR, dulita 36 EUR.*
*Prezo en luksa ĉambro: unupersona 67 EUR, dulita 39 EUR.*

**4. Hotelo Golden Key (3★)**
**65 Quan Su-str., Hoan Kiem-dist., Hanoi**
800 metrojn de Melia Hanoi.
La ĉambroj havas televidilon, telefonon. La matenmanĝo estas inkluzivigita kaj interretkonekto estas senpaga.
*Prezo en ĉambro: unupersona 54 EUR, dulita 31 EUR.*

**5. Hotelo Saigon (3★)**
**80 Ly Thuong Kiet-str., Hoan Kiem-dist., Hanoi**
600 metrojn de Melia Hanoi.
La ĉambroj havas sekurŝrankojn, televidilon, telefonon. La matenmanĝo estas inkluzivigita kaj interretkonekto estas senpaga.
*Prezo en ĉambro: unupersona 49 EUR, dulita 27 EUR.*



**6. Hotelo Trade Union (3★)**
**14 Tran Binh Trong-str, Hoan Kiem-dist., Hanoi**
800 metrojn de Melia Hanoi.




La hotelo havas restoracion kaj senpagan interretkonekton, la matenmanĝo estas inkluzivigita. La ĉambroj, en du kategorioj laŭ grandeco, havas televidilon, telefonon kaj sekurŝrankon.
*Prezo en ĉambro: unupersona 51 EUR, dulita 31 EUR.*
*Prezo en luksa ĉambro: unupersona 63 EUR, dulita 36 EUR.*

**7. Hotelo Zenith (3★)**
**96-98 Bui Thi Xuan-str., Hoan Kiem-dist., Hanoi**
1700 metrojn de Melia Hanoi.
La matenmanĝo estas inkluzivigita en la prezo kaj interretkonekto estas senpaga. La ĉambroj havas televidilon, telefonon kaj sekurŝrankon.
*Prezo en ĉambro: unupersona 44 EUR, dulita 25 EUR.*



**8. Hotelo Asean (3★)**
**12 Ngo Si Lien-str., Hanoi**
2000 metrojn de Melia Hanoi.



Moderna kaj komforta hotelo kun satelita LCD-televidilo, sekurŝranko kaj telefono en la ĉambro, senpaga sendrata interretkonekto. Surtegmenta kafejo kun aparta vido al la urbo. Matenmanĝo inkluzivigita. La hotelo havas masaĝklinikon kaj du ĉambrokategoriojn, laŭ grandeco.
*Prezo en ĉambro: unupersona 39 EUR, dulita 27 EUR.*
*Prezo en luksa ĉambro: unupersona 44 EUR, dulita 29 EUR.*

**9. Gastejo Trade Union (2★)**
**95 Tran Quoc Toan-str., Hoan Kiem-dist., Hanoi**
1500 metrojn de Melia Hanoi.



La gastejo estas moderna kaj komforta kaj ofertas senpagan interretkonekton. La matenmanĝo estas inkluzivigita. La ĉambroj havas televidilon, telefonon.
*Prezo en ĉambro: unupersona 39 EUR, dulita 22 EUR.*

**10. Hotelo Nam Ngu (3★)**
**34 Nam Ngu-str., Hoan Kiem-dist., Hanoi**
950 metrojn de Melia Hanoi.
Moderna kaj komforta hotelo kun senpaga interretkonekto. La matenmanĝo estas inkluzivigita. Kafo kaj teo senpagaj en la ĉambro kaj ankaŭ 2 boteloj da akvo tage. La ĉambroj havas satelitan televidilon, telefonon, sekurŝrankon, hararsekigilon, fridujeton.
*Prezo en ĉambro: unupersona 37 EUR, dulita 25 EUR.*

**11. Hotelo Huong Giang (2★)**
**80 Mai Hac De-str., Hai Ba Trung-dist., Hanoi**
1700 metrojn de Melia Hanoi.
Modesta kaj komforta hotelo. La ĉambroj havas televidilon kaj telefonon. La matenmanĝo estas inkluzivigita kaj interretkonekto estas senpaga.
*Prezo en ĉambro: unupersona 29 EUR, dulita 17 EUR.*

# Antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj

Jen ni elektis por la partoprenantoj de la UK en Hanojo la plej belajn lokojn por ekskursi en Vjetnamio kaj Kamboĝo. La ekskursoj konatigos vin kun la nordo, centro kaj sudo de Vjetnamio kaj kun la temploj de Angkor Wat en Kamboĝo.

La prezoj inkluzivas:
– restadon en komfortaj hoteloj (3- aŭ 4-stelaj);
– matenmanĝojn;
– se indikite en la ekskurspriskriboj, ankaŭ aliajn manĝojn;
– transporton per komfortaj klimatizataj turismaj busoj kaj la flugojn por P1 kaj P2;
– kie indikite ankaŭ transporton per boato, ĉaro aŭ alia transportilo;
– enirbiletojn al la vizitotaj lokoj laŭ la ekskursopriskriboj;
– Esperantajn ĉiĉeronojn.

La prezoj ne inkluzivas:
– ekstrajn elspezojn en la hoteloj, ekz. telefonvokojn;
– trinkaĵojn;
– krommonon.

La ekskursoj devas havi minimume 16 partoprenantojn. Se estos malpli ol la necesa nombro de partoprenantoj en iuj ekskursoj, la prezoj altiĝos aŭ la koncernaj ekskursoj estos nuligitaj. En tiaj okazoj la mendintoj estos ĝustatempe informitaj pri tio kaj povos ŝanĝi al alia aŭ entute nuligi sian mendon.

Partoprenantoj de la postkongresaj ekskursoj, bv. atenti pri la neceso akiri vizon por Kamboĝo kaj re-eniran/plur-eniran vizon en Vjetnamio!

## Antaŭkongresa ekskurso

### **A1** Ninh-Binh-provinco kaj malnova ĉefurbo Hoa Lu

*27-a – 28-a de julio, 2 tagoj/1 nokto*

---



**27.07** Forveturo de antaŭ Melia Hanoi je la 8h30 al la malnova ĉefurbo de Vjetnamio, Hoa Lu. La loko kie estas konstruita la urbo havas naturan protekton kaj specialan naturan belecon. Tie oni vizitos la templojn memorigajn al la imperiestroj Dinh kaj Le. Oni daŭrigos la veturon al Tam Coc, regiono kun altaj montoj konstante verdaj, ĉirkaŭitaj de rizplantejoj, kiujn oni rigardos dum 3-hora remboata ekskurso. La loko estas konata ankaŭ kiel la Halong-golfeto surtere, kaj kelkaj konsideras ĝin eĉ pli bela ol la surmaraj montoj de la Halong-golfeto. Tie oni vizitos ankaŭ la grotojn de Tam Coc kaj konatiĝos kun la loka kamparana vivo. Lunĉo kaj vizito de Co Vien Lau (kolekto de malnovaj vjetnamaj domoj) kaj de la pagodo Bich Dong. Tranokto en la hotelo Thuy Anh 4★ (aŭ similkategoria hotelo) en Ninh Binh.

**28.07** Matenmanĝo kaj forveturo por viziti la ŝtonan katedralon Phat Diem. Dezajnita de pastro Sau ĝi estas bela ekzemplo de eŭropa katedralo kaj komuna vjetnama domo konstruita el ŝtonoj kaj ligno. Reveno al Ninh Binh por lunĉo kaj veturo al la Bai-Dinh-pagodo. Post la vizito al la pagodo reveno al Hanojo. Alveno en Melia Hanoi ĉirkaŭ la 18h00. Fino de la servoj.

**Prezoj:** Loko en ĉambro: unupersona 88 EUR; dulita 79 EUR.

**Ekstraj noktoj en Hanojo en Melia Hanoi.** Loko en unupersona ĉambro 117 EUR; dulita 68 EUR.

## Postkongresaj ekskursoj

### P1 Ho-Ĉi-Min-urbo kaj Kamboĝo

*05-a – 08-a aŭgusto, 4 tagoj/3 noktoj*

---



**05.08** Je la 7h00 forveturo de Melia Hanoi al la flughaveno por preni la flugon al Ho-Ĉi-Min-urbo (Sajgono). Alveno, transporto al la hotelo Saigon Oscar 4★ (aŭ similkategoria hotelo), tagmanĝo kaj ripozo. Je la 14h00 forveturo por viziti la Muzeon pri la Militrestaĵoj, la katedralon, la poŝtoficejon, kaj la Reunuigan Palacon (konata ankaŭ kiel Sendependeca Palaco). Vespermanĝo je la 19h00 kaj libera vespero.

**06.08** Matenmanĝo kaj forveturo al la urbo My Tho, la ĉefurbo de la provinco Tien Giang. Vizito al la plej bela pagodo de la provinco, Vinh Trang, konstruita laŭ diversaj stiloj. Tuj poste boata promeno ĉirkaŭ 4 ĉiam verdaj insuletoj en la Mekong-rivero: Drako, Fenikso, Testudo kaj Unikorno. Tiuj belegaj insuloj ankoraŭ restas nekonataj al multaj homoj. Oni malkovros belegajn pejzaĝojn kaj vidos kia estas la kamparana vivo en la Mekonga Delto. En la vilaĝo Quoi An oni vizitos domon faritan plene el kokosarbo kaj vidos kiel la lokanoj utiligas ĉion de tiuj arboj, sen ajna perdo. Dum la promeno ĝuu la sezonajn fruktojn kaj lokajn muzikojn. Oni vizitos la fruktplantejojn ĉe la vilaĝo Ben Truc per ĉevalĉaro, trinkos lokan teon kun mielo aŭ brandon, kaj remante tra rivereto vizitos kokosdolĉaĵan fabrikon. Tagmanĝo kaj reveno al Ho-Ĉi-Min-urbo. Vespermanĝo kaj libera tempo.

**07.08** Je la 6h30 preno de matenmanĝa skatolo kaj forveturo al la flughaveno por la flugo al Siem Reap en Kamboĝo. Alveno, enhoteliĝo en la hotelo Royal Empire 4★ (aŭ similkategoria hotelo), tagmanĝo, ripozo kaj vizito de la mirinda templo de Angkor Wat, enlistigita kiel unu el la Mondaj Heredaĵoj de Unesko. Rigardado de la sunsubiro ĉe la monteto Phnom Bakheng. Vespermanĝo en loka restoracio kun tradiciaj muziko kaj dancado.

**08.08** Matenmanĝo kaj vizito al la suda pordego de Angkor Thom, la Bayon-komplekso kaj aliaj temploj, kiel Baphon kaj Phimean Akas, la Elefantaj- kaj la Lepra-Reĝo-terasoj. Tagmanĝo. Posttagmeze vizito al la Taprom-praarbaro, Banteai Kdei, Chao Sai Tevda, Tommanogn-templo kaj Srah Srang. Transporto al la flughaveno kaj fino de la servoj.

– La prezo inkluzivas la flugojn de Hanojo al Ho-Ĉi-Min-urbo kaj de Ho-Ĉi-Min-urbo al Siem Reap, ĉiujn transportojn per buso kaj boato, kaj ĉiujn manĝojn cititajn en la ekskurspriskribo.
– La prezo *ne* inkluzivas vizojn. Se necese, la Kongresa Fako povas helpi aŭ peri la aĉeton de flugoj de Siem Reap reen al Ho-Ĉi-Min-urbo aŭ Hanojo. Ju pli frue oni aĉetas la flugojn, des pli malmultekostaj ili estas.
– La Kongresa Fako povas helpi ankaŭ pri mendo de ekstraj noktoj en Siem Reap, Ho-Ĉi-Min-urbo kaj Hanojo.

**Prezo:** Loko en ĉambro: unupersona 790 EUR; dulita 690 EUR.

## **P2** Centra kaj suda Vjetnamio kaj Angkor-Wat-temploj en Kamboĝo

*05-a – 11-a aŭgusto, 7 tagoj/6 noktoj*

---

**05.08** Je la 9h00 forveturo de Melia Hanoi al la flughaveno por preni la flugon al Hue. Hue, Monda Heredaĵo de Unesko, estas la intelekta, arkitektura kaj spirita koro de Vjetnamio. Palacoj, temploj, pagodoj, tomboj, kulturo, kuirarto kaj historio – ĉio troviĝas en Hue, kiu estis la ĉefurbo de la Nguyen-imperiestroj. Alveno, transporto al la hotelo Ngo Huang 3★ (aŭ similkategoria hotelo), enhoteliĝo, lunĉo kaj ripozo. Je la 14h00 forveturo por viziti la tombojn de la imperiestroj Tu Duc kaj Khai Dinh. Majestaj konstruaĵoj impresas pro la grandeco, lokiĝo kaj beleco de la naturo integrita en la konstruaĵoj. Vespermanĝo en loka restoracio kaj ŝipveturo sur la parfuma rivero kun aŭskultado al reĝa kortega muziko.

**06.08** Matenmanĝo kaj forveturo por konatiĝi kun la Reĝa Citadelo, ekkonstruita en 1804, la plej fama loko en Hue. Malgraŭ la konstanta bombardado fare de la usona armeo, la loko ankoraŭ impresas la vizitantojn pro sia imponeco. Lunĉo kaj vizito de la pagodo Thien Mu, unu el la plej ikonaj konstruaĵoj en Vjetnamio. Plua vizito al la palaco Hon Chen. Vizito al la bazaro Dong Ba, la plej granda en la regiono. Vespermanĝo kaj libera tempo.


**07.08** Matenmanĝo kaj foriro al Hoi An. Survoje halto ĉe la strando Lang Co, konsiderata unu el la 29 plej belaj strandoj en la mondo. Tie oni vizitos ankaŭ la pasejon Hai Van, la solan vojon eblan por atingi la sudon dum la milito. Alveno, enhoteliĝo en Hoi An Beach Resort 4★ (aŭ similkategoria hotelo). Lunĉo kaj ripozo. Hoi An estas konata ankaŭ kiel vivanta muzeo. La urbo estis internacia komerchaveno en la 17-a jarcento. Oni povas ankoraŭ rimarki la japanan, ĉinan kaj eŭropan influojn en la lokaj arkitekturo kaj arto. Promenante tra la mallarĝaj

stratetoj, oni facile imagas kia estis la vivo en tiu urbo antaŭ pli ol 150 jaroj. Posttagmeza vizito al la Malnova Urbo, Unesko-heredaĵo. Interalie oni vizitos la domon Tan Ky, konstruitan en la 19-a jarcento kaj bone konservitan; la halon Phuc Kien; la Kovritan Japanan Ponton (la "gardistoj" en unu fino estas simioj kaj en la alia hundoj, laŭdire pro la jaroj kiam oni komencis kaj finis ĝian konstruadon laŭ la ĉina horoskopo); kaj la malnovan domon Phung Hung, konatan ankaŭ kiel la Lanterna Domo pro sia dekoracio. Vespermanĝo kaj libera tempo.

**08.08** Matenmanĝo kaj forveturo al My Son, la malnova Cham-urbo kaj eble la loko kun plej mirinda vidaĵo en la regiono, same en la listo de Mondaj Heredaĵoj de Unesko. La ruinoj situas en valo ĉirkaŭita de impresa naturo kaj sub la monto Hon Quap (Dento de Kato). My Son iĝis religia centro en la 4-a jarcento, sub la regado de la reĝo Bhadravarman, kaj restis plene loĝata ĝis la 13-a jarcento, la plej longa tempo de disvolviĝo de kiu ajn urbo en la Mekonga regiono. Lunĉo kaj vizito al Ngu Hanh Son (Marmora Monto), la pagodo Tam Thai, la groto Huyen Khong kaj la pagodo Linh Ung. Vespermanĝo je la 17h30 en Da Nang kaj foriro al la flughaveno por la flugo al Ho-Ĉi-Min-urbo (Sajgono) je la 19h40. Alveno, transporto al la hotelo Continental 4★ (aŭ similkategoria hotelo), enhoteliĝo kaj ripozo.

**09.08** Matenmanĝo kaj elhoteliĝo. Veturo al la tuneloj Cu Chi, reto de 200 km de tuneloj uzataj dum la milito kontraŭ la francoj kaj la usonanoj. La tuneloj iris de la limo kun Kamboĝo ĝis ĉirkaŭ nur 30 km de Ho-Ĉi-Min-urbo. Kelkaj partoj estis larĝigitaj sed aliaj restas netuŝitaj, por ke oni povu havi plenan ideon pri tio kia estis la vivo de la vjetkongoj en tiuj tuneloj. Reveno al Ho-Ĉi-Min-urbo, lunĉo kaj vizito al la Muzeo pri la Militrestaĵoj, la katedralo, la poŝtoficejo, kaj la Reunuiga Palaco (konata ankaŭ kiel la Sendependeca Palaco). Reveno al la hotelo por preni la valizojn, veturo al la flughaveno por la flugo al Siem Reap en Kamboĝo. Leĝera manĝo en la aviadilo. Alveno, transporto al la hotelo Kingdom Angkor 4★ (aŭ similkategoria hotelo), enhoteliĝo kaj ripozo.

**10.08** Matenmanĝo kaj vizito al la mirindaj temploj de Angkor Wat. Angkor Wat estas la plej granda religia konstruaĵo en la mondo, la nacia simbolo de la ĥmeroj, en la listo de Mondaj Heredaĵoj de Unesko. Male ol aliaj Angkor-monumentoj, Angkor Wat neniam estis forlasita, do ĝi bone konserviĝis ĝis hodiaŭ. Ĝia disdivido, same kiel aliaj mont-temploj de Angkor, simulas la universon laŭ la ĥmera kompreno: la centra turo estas la monto Meru, sekvata de pli malaltaj "montoj"





ligitaj per la “kontinentoj” (malaltaj kortoj) kaj la “oceanoj” (kanaloj). *Naga* servas kiel simbola ponta ĉielarko per kiu la homoj atingu la diojn. En la temploj cirkulas simioj, kiuj povas mordi se oni tro apudiĝas al ili. Poste vizito al Angkor Thom (Granda Urbo), murĉirkaŭita urbo de dek kvadrataj kilometroj kun kvin pordegoj 20 metrojn altaj. En sia apogeo, ĉirkaŭ la jaroj 1200, oni kredas ke la urbo havis ĉirkaŭ unu milionon da loĝantoj. Rigardado al la Baphoun-templo, piramida reprezento de la mistika monto Meru, finrenovigita en 2008. Vizito al Bayon, palaco de la reĝo Jayavarman VII. Ĝiaj 54 gotikaj turoj estas dekoraciitaj per 216 enormaj ridetantaj vizaĝoj de Avalokiteŝvaro. Bayon estas dekoraciita per 1,2 kilometroj de eksterordinaraj reliefoj kun pli ol 11 000 figuroj, i.a. bildoj de la kamboĝa vivo en la 12-a jarcento. Vizito al la Placo de la Elefantoj, 350 metrojn longa placo dekoraciita per statuoj de paradantaj elefantoj. La loko estis uzata por publikaj ceremonioj kaj kiel bazo por la reĝa Aŭdienca Granda Halo. Lunĉo en loka restoracio kaj vizito al Ta Keo, probable la unua templo plene konstruita el sabloŝtono fare de la ĥmeroj, ĉirkaŭ la jaro 1000. Ĝi tamen ne estis finita, plej verŝajne pro la morto de la reĝo Jayavarman V. Plua vizito al la templo Ta Prohm, kie oni iĝos memorigita pri la forto de la naturo, ĉar tiu templo estas plene surkreskita de ĝangalaj plantoj. Vespermanĝo en la hotela restoracio. Libera tempo.

**11.08** Matenmanĝo kaj vizito al la Kultura Vilaĝo, kie oni konatiĝos kun la diversaj tradicioj en Kamboĝo pere de muziko, dancoj, skulptaĵoj, rigardo al manartaĵoj k.a. Vizito al la templo Preah Khan, unu el la plej grandaj en Angkor. Ĝiaj labirintaj volbaj koridoroj kaj impresaj gravuritaj ŝtonoj estas aparte belaj. Lunĉo kaj libera tempo. Transporto al la flughaveno de Siem Reap kaj fino de la servoj.

– La prezo inkluzivas la flugojn de Hanojo al Hue, de Da Nang al Ho-Ĉi-Min-urbo kaj de Ho-Ĉi-Min-urbo al Siem Reap, ĉiujn aliajn surterajn transportojn kaj manĝojn menciitajn en la ekskurspriskribo.

– La prezo *ne* inkluzivas vizojn. Se necese, la Kongresa Fako povas helpi aŭ peri la aĉeton de flugoj de Siem Reap reen al Ho-Ĉi-Min-urbo aŭ Hanojo. Ju pli frue oni aĉetas la flugojn, des pli malmultekostaj ili estas.

– La Kongresa Fako povas ankaŭ helpi pri mendo de ekstraj noktoj en Siem Reap, Ho-Ĉi-Min-urbo kaj Hanojo.

**Prezo:** Loko en ĉambro: unupersona 1050 EUR; dulita 860 EUR.

# Dumkongresaj ekskursoj

**Kiel mendi ekskursojn?**
Bv. atente tralegi la priskribojn kaj elekti. Post la elekto, plenigu klare kaj atente (preslitere) la koncernan parton de la mendilo kaj sendu ĝin samtempe kun via pago al Roterdamo. Prefere uzu la retan mendilon. Se en via lando estas kongresa peranto, vian mendon/pagon vi povas sendi al ŝi aŭ li. Por malmendoj validas la kondiĉoj presitaj dorsflanke sur la mendilo. Bv. ĉiam sendi la mendilon kaj pagon al la sama adreso, t.e. instanco.

**Ĝeneralaj kondiĉoj**
Ĉar ĉiuj ekskursoj dependas de minimumo da partoprenantoj, la organizantoj rezervas al si la rajton eventuale nuligi iujn ekskursojn, pri kio ni klopodos averti vin kiel eble plej frue antaŭ la kongreso, kun propono de eblaj alternativoj.

Ĉiuj ekskursoj startas de antaŭ la hotelo Melia Hanoi. Klopodu veni dek kvin minutojn antaŭ la indikita starthoro de la ekskurso. Ĉiujn ekskursojn akompanos esperantlingvaj interpretistoj. Ili ne estas profesiaj ĉiĉeronoj sed nur bonvolaj helpantoj. Bv. indulgi ilin per pacienco kaj samideana komprenemo. Ili faros sian plejeblon por bone servi al vi. Ĉiuj prezoj estas en eŭroj (EUR).

Kun la kongresaj dokumentoj ĉiuj mendintoj ricevos koverton kun la biletoj de la menditaj kongresaj ekskursoj. Sur la biletoj estos bazaj informoj pri la ekskurso (dato, horo, buso), kiuj eventuale povos malsami ol tiuj presitaj en la Dua Bulteno. Kaze de malsameco validas la informoj sur la biletoj. Ne forgesu preni ŝirmilojn kontraŭ la suno kaj varmo! Bv. noti ke la tereno en kelkaj ekskursoj povas esti netaŭga por homoj kun marŝhandikapoj. La priskriboj de la ekskursoj kutime mencias tion.

**Servoj inkluzivigitaj:**
- ĉiĉeronado de loka turisma servo kaj esperantlingva ĉiĉerono;
- vojaĝo per altnivelaj busoj (kaj alia transportilo, se parto de la ekskurso);
- enirbiletoj de la vizitataj lokoj.

**Ni rekomendas** al la partoprenantoj de la dumkongresaj ekskursoj porti komfortajn ŝuojn, leĝerajn vestaĵojn, sunprotektan kremon kaj sunŝirmilon (ĉapon, sunombrelon aŭ simile).

# Tuttagaj ekskursoj

La tuttagaj ekskursoj okazos precipe en merkredo, la 1-a de aŭgusto, sed ankaŭ en aliaj tagoj. La prezoj inkluzivas enirbiletojn kaj, se indikite, tagmanĝon. Ĉiuj ekskursaj busoj estas altkvalitaj kaj klimatizataj.

## E1 Krozo tra Halong-golfeto

*Lundo kaj merkredo* *7h30 – 19h00* *Prezo: 39 EUR*



La Halong-golfeto estas en la listo de Unesko de Mondaj Heredaĵoj kaj unu el la plej konataj pejzaĝoj de Vjetnamio. La tuta golfeto havas pli ol 3 000 insulojn, kiuj estis skulptitaj laŭ la daŭro de la jarmiloj fare de vento kaj ondoj. Alvenante al la golfeto oni prenos ŝipeton por 4-hora krozado kaj havos rigardon al la plej belaj anguloj; la ekskurso inkluzivas viziton al unu el la kavernoj de la regiono. Dum la krozado okazos la lunĉo.

## E2 Manartaĵaj vilaĝoj

*Mardo kaj merkredo* *8h00 – 18h00* *Prezo: 33 EUR*

En la ĉirkaŭo de Hanojo estas du vilaĝoj famaj pro siaj manartaĵoj: Bat Trang pro sia keramiko (fakte hanojanoj venas ĉi tien por aĉeti siajn keramikaĵojn) kaj Dong Ho pro siaj popolaj pentraĵoj. Eblos sekvi la kreadprocezon kaj ankaŭ aĉeti unikajn suvenirojn. La ekskurso inkluzivas viziton al la Chua-But-Thap-pagodo, unu el la plej rimarkindaj en la nordo de Vjetnamio. Piknika lunĉo dum la vojaĝo.



## E3 Ninh Binh-regiono


*Merkredo* *8h00 – 18h00* *Prezo: 28 EUR*



Vizito al la regiono konata kiel "Tera Halong-golfeto" ĉar ĝi havas similaspektajn montetojn al tiuj de la Halong-golfeto. La diferenco estas, ke ĉi tie la rigardado al la natura belaĵo estas el boatetoj, kiuj iras laŭ riveretoj tra la rizplantejoj. Oni ankaŭ vizitos la templojn memorigajn pri la imperiestroj Dinh kaj Le, kaj la Bich Dong-pagodojn. Lunĉo dum la vojaĝo.

## E4 Mai Chau – montara tribo

*Merkredo kaj ĵaŭdo* *8h00 – 18h00* *Prezo: 35 EUR*



Alvenante oni havos fabelan panoramon de Mai Chau, rigardata de la supro de la Cun-monto. La vilaĝo estas ĉe verda valo kaj la grandaj domoj, konstruitaj sur palisoj, havas palmfoliojn kiel tegmenton kaj poluritajn bambuojn kiel plankon. Oni promenos tra la vilaĝo kaj vidos kiel la Tai-minoritato produktas *tho cam*, la materialon el kiu ili faras siajn vestaĵojn. La lunĉo estos ĉe loka familio.

## E5 Chua Huong – Parfuma Pagodo

*Merkredo kaj vendredo* *8h00 – 18h00* *Prezo: 29 EUR*



La Parfuma Pagodo estas unu el la ĉefaj turismaj lokoj de la hanoja regiono kaj la plej grava budhista loko en la lando. Printempe miloj da vjetnamoj pilgrimas tien por peti sanon kaj prosperon. La pagodo troviĝas enkonstruita meze de enorma groto en kalkmonto, atingebla nur per boatetoj aŭ piede. Dum la ekskurso oni estos portata tra rava pejzaĝo ĉe akvovojoj, aprezos la naturon el krutaj vojetoj tra la monto, kaj vizitos la pagodojn kaj templojn konstruitajn en la regiono en la daŭro de jarcentoj. Telfero ligas la bazon de la monto kun la temploj. Pro la granda kvanto de ŝtupoj kaj ne-plata tereno en la groto, la ekskurso ne estas rekomendata al homoj kun marŝproblemoj.

# Duontagaj ekskursoj

## D1 Hanojo posttagmeze

*Sabato, dimanĉo kaj mardo* *13h00 – 18h00* *Prezo: 30 EUR*



Oni vizitos unue la Etnologian Muzeon, unu el la plej bonaj inter la vjetnamaj muzeoj, kie oni vidos fotekspoziciojn kaj verajn domojn de kelkaj el la 54 etnoj en Vjetnamio. Daŭrigo per tricikla veturado tra la Malnova Kvartalo de Hanojo kaj laŭ la lago Hoan Kiem,

la ĉefa renkontiĝejo en la urbo. Fine oni spektos unikan prezentadon en la Thang-Long-akvopupejo. La akvopupoj estas tipe vjetnama artaĵo: neniu devus maltrafi tiun sperton!

## D2 Hanojo matene

*Mardo kaj ĵaŭdo* *8h30 – 13h30* *Prezo: 26 EUR*



La ekskurso komenciĝos per vizito al la maŭzoleo de Ho-Ĉi-Min, vaste konata kiel Onklo Ho, kie oni povas vidi la vitran sarkofagon kun lia konservata korpo. Daŭrigo preter la Prezidenta Palaco kaj la ligna domo de Onklo Ho – li rifuzis vivi en luksa domego celita por la prezidentoj. En la sama komplekso troviĝas la Unukolona Pagodo, konstruita en la 11-a jarcento, simbolanta gigantan lotusfloron. Daŭrigo al la Templo de Literaturo, la plej malnova universitato de Vjetnamio, dediĉita al Konfuceo. La loko estas dekoraciita, interalie, per statuoj de Konfuceo kaj liaj plej bonaj disĉiploj kaj enormaj testudoj, kiuj reprezentas longvivon en la vjetnama kulturo. Ĝi estas unu el la plej impresaj lokoj en Hanojo kun siaj kvin kortoj. La mandarenoj studis ĉi tie antaŭ ol esti akceptitaj en la imperiestra kortumo. Daŭrigo piede tra la Malnova Kvartalo de Hanojo kaj la lago Hoan Kiem.

**Bv. atenti** ke estas malpermesite eniri la maŭzoleon en mallonga pantalono aŭ jupo, aŭ en senmanika (T-)ĉemizo!

## D3 Silka vilaĝo kaj konusĉapa vilaĝo

*Lundo* *7h30 – 12h30*
*Vendredo* *13h00 – 18h00* *Prezo: 32 EUR*



La silkproduktado troviĝas tra la tuta Vjetnamio sed en la vilaĝo Van Phuc ĝi estas konsiderata la plej tradicia kaj specialiĝinta. En la vilaĝo oni produktas diversajn tipojn de silko: nubajn, sablajn, krespajn, satenajn ktp. Same enlande kiel eksterlande tiuj silkoj estas aparte aprezataj. Daŭrigo al la Chuong-konusĉapa vilaĝo, eta vilaĝo kun pli ol tri-jarcenta reputacio pri produktado de la plej bonaj *Non* (konusaj ĉapoj). La ĉapo protektas kontraŭ suno kaj pluvo kaj estas farata el bambuo, folioj kaj rotangoj. Praktike ĉiuj en la vilaĝo scipovas fabriki la ĉapon, sed granda sperto estas necesa por bona fina rezulto.

## D4 Tai-pagodo kaj Tay Phuong-pagodo

*Lundo kaj ĵaŭdo* *13h00 – 18h00* *Prezo: 32 EUR*



La Tai-pagodo estas tre fama pagodo, dediĉita al Thich-Ca-Budho, Sakyamuni kaj 18 aliaj homoj kiuj atingis altan nivelon de spirita disvolviĝo. La pagodo konsistas el tri partoj: la plej ekstera por ceremonioj kaj oferoj; la meza por kulti / preĝi al Budho; kaj la plej interna por kulti la monaĥon Tu Dao, la majstron kiu donas sian nomon al la templo. En la apudeco troviĝas la kavernoj Cac Co kaj la pagodo Phat Tich. Daŭrigo al la pagodo Tay Phuong (Okcidenta Pagodo), konata ankaŭ kiel la pagodo Sung Phuc. Ĝi estis konstruita dum la 6-a kaj 7-a jarcentoj kaj renovigita diversfoje. Ĝi havas tri nivelojn: la supran sanktejon, la mezan malantaŭan palacon kaj la subajn halojn. Kun siaj ĉirkaŭ 80 statuoj, sonorilo el 1796 kaj diversaj altaroj, ĝi ne nur havas historian gravecon, sed ankaŭ estas tre interesa arkitekture.

# Semajna skemo de ekskursoj

**T** = tuttaga ekskurso; **M** = duontaga ekskurso matene; **P** = duontaga ekskurso posttagmeze.

| | Sab 28/07 | Dim 29/07 | Lun 30/07 | Mar 31/07 | Mer 01/08 | Ĵaŭ 02/08 | Ven 03/08 | Prezo |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| E1 Halong-golfeto | | | T | | T | | | 39 EUR |
| E2 Manartaĵaj vilaĝoj | | | | T | T | | | 33 EUR |
| E3 Ninh Binh-regiono | | | | | T | | | 28 EUR |
| E4 Mai Chau-tribo | | | | | T | T | | 35 EUR |
| E5 Parfuma Pagodo | | | | | T | | T | 29 EUR |
| D1 Hanojo ptm | P | P | | P | | | | 30 EUR |
| D2 Hanojo atm | | | | M | | M | | 26 EUR |
| D3 Vilaĝoj | | | M | | | | P | 32 EUR |
| D4 Pagodoj | | | P | | | P | | 32 EUR |

# Bankedo

La bankedo okazos lundon, la 30-an de julio, je la 19h30, en salono Hodler.

**Antaŭpladoj**

*Freŝprintempaj rulaĵoj kun pandalo kaj freŝfrititaj nudeloj*
*Krustecaj fritaĵoj el japanaj ostroj kun dolĉ-pika saŭco*

**Supo**

*Mar-kukuma supo kun nigraj fungoj*

**Ĉefpladoj**

*Krustecaj fritaĵoj el molŝela krabo kun tamarinda saŭco*
*Kradrostita* tam-*fiŝo kun kurkumo*
*Vjetnamstila* luk-lak-*bovaĵo*
*Vaporkuirita kokido kun fungoj*
*Kirlfritita krispa brasiko kun ostro kaj funga saŭco*
*Vaporkuirita blanka rizo servata kun vjetnamstila acida pektena buljono*

**Deserto**

*Malvarma sagukremo kun kokosa lakto*

***Vegetara Menuo***

**Antaŭpladoj**

*Marinita pikvermiĉela salato kun celerio*
*Printempaj krustecaj rulaĵoj el vegetaĵoj*
*Lotustiga salato kun rostitaj arakidoj*

**Supo**

*Dolĉmaiza supo kun asparago*

**Ĉefpladoj**

*Frititaj krustaĵoj el vegetaĵoj kun* teriyaki-*saŭco*
Massalaj-*kikeroj kun krusteca* papadam
*Dolĉ-acida fazeola kazeo*
*Leĝerfritita brokolo kun funga saŭco*
*Fritita rizo kun vegetaĵoj*

**Deserto**

*Malvarmaj lotusaj semoj kun longano*

**Trinkaĵoj** *(senlime dum du horoj)*
*Blanka kaj ruĝa vino / Biero / Gastrinkaĵoj / Akvo*

**Prezo: 50 EUR**

# Provizora programo

Ĉi tie aperas nur la plej gravaj programeroj. La Estraro de UEA rezervas al si la rajton fari ŝanĝojn.

**Sabato, 28 julio.** Loĝigo. Malfermo de la kongresejo je la 9h00. Alveno de kongresanoj kaj registriĝo. Disdonado de dokumentoj. Komitato de UEA. Unuafojaj Kongresanoj (17h00). Artistoj. Libroservo. Movada Foiro/Interkona Vespero. Giĉetoj funkcias ĝis la 18h00.

**Dimanĉo, 29 julio.** Solena Inaŭguro (10h00). Ekumena Diservo. Inaŭguro de IKU/AIS. Kongresa Temo. Paroligaj Kursoj. Vjetnama Eksprese. Libroservo. Nacia Vespero.

**Lundo, 30 julio.** Kleriga Lundo. ILEI. IKU-prelegoj. Paroligaj Kursoj. Vjetnama Eksprese. KER-Ekzamenoj (registriĝo). Libroservo. Bankedo. Balo.

**Mardo, 31 julio.** Tago de la Lernejo. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Paroligaj Kursoj. Vjetnama Eksprese. KER-Ekzamenoj. Estraro Respondas. Landa Agado. Delegita Reto. Libroservo. Societo Zamenhof. Teatro.

**Merkredo, 1 aŭgusto.** Tuttagaj ekskursoj. Kongresejo fermita.

**Ĵaŭdo, 2 aŭgusto.** Tago de la Libro. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Esperantologia Konferenco. Belartaj Konkursoj. Paroligaj Kursoj. KER-Ekzamenoj. CO Respondas. Urba Akcepto (por invititoj). Libroservo. Koncerto.

**Vendredo, 3 aŭgusto.** Komitato de UEA. IKU-prelegoj. Paroligaj Kursoj. Faka Forumo. Aŭkcio. Venontaj UK-oj. Libroservo. Internacia Arta Vespero.

**Sabato, 4 aŭgusto.** Solena Fermo (10h00). Libroservo (ĝis la 14h00). Fermo de la kongresejo (14h00).

**Reta kurso pri Vjetnamio.** La instrua retejo edukado.net proponas la kurson *Kultura vojaĝo al Vjetnamio*, per kiu oni povas konatiĝi kun la historio, kulturo, geografio, politiko, turismaj vidindaĵoj, religioj, artoj k.a. aspektoj de la kongreslando. Ĝi konsistas el 20 lecionoj, kun la LKK-ano Nguyen Xuan Thu kiel ĉiĉerono kaj Katalin Kováts kiel kursgvidanto. Ĉiun lecionon sekvas testo, kiu helpas pli bone alproprigi ĝian enhavon. La kurskotizo estas 30 eŭroj. Oni povas aliĝi al la kurso kiam ajn ĉe www.edukado.net.

# Programeroj dum UK




**Novtipaj KER-ekzamenoj de UEA je tri niveloj.** La novtipa KER-ekzamensistemo de UEA funkcias jam de januaro 2009. Dum la kongreso okazas ĉiam la ĉefa ekzamensesio de la jaro; tial ankaŭ en Hanojo estos eblo trapasi la ekzamenojn je ĉiuj tri – B1, B2 kaj C1 – niveloj. Ekzameniĝi eblas ne nur en la kompleta formo, sed ankaŭ en nur unu el la ekzamentipoj: skriba aŭ parola.

La ekzamensistemo estas ellaborita surbaze de la manlibro de la Konsilio de Eŭropo: *Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj: lernado, instruado, pritaksado*. La sukcesaj trapasintoj de la ekzameno ricevos kvarlingvan (Esperanto, angla, franca kaj germana) diplomon, eldonitan de ITK, la ŝtate agnoskita, plej granda ekzamencentro de Hungario.

La plurhoraj skribaj sesioj kaj la aŭdkomprena parto de la ekzameno okazos vendredon, la 3-an de aŭgusto, fruposttagmeze. Por la parola parto (20-minuta individua sesio) oni povas elekti tempon laŭ la vico de la aliĝoj, jam antaŭ la UK aŭ surloke.

Aliĝi al la ekzamenoj eblos ankoraŭ dum la kongreso, sed por la parola parto la ekzamenebloj estas limigitaj. Ju pli frua aliĝo, des pli granda ŝanco ricevi ekzamenlokon.

La ekzamenkotizoj estas diversaj, laŭ la landkategorioj de la membrokotizoj de UEA. La kotizo pageblas per antaŭa ĝiro al UEA-konto, aŭ surloke ĉe la kongresa kaso.

Interesiĝantoj povas peti ekzamenspecimenojn kaj helpon ĉe la teamo de www.edukado.net.

Pliajn informojn pri la ekzameno (postuloj, prezoj, statistiko, specimenoj ktp) legu kaj akiru:

- en la libro *Esperanto de nivelo al nivelo*;
- ĉe http://edukado.net/ekzamenoj/ker;
- aŭ petu ĉe katalin@ikso.net.

**Paroligaj kursoj kun edukado.net**. Kiel tradicie jam de pluraj jaroj, la porinstruista retejo edukado.net denove gvidos paroligajn kursojn por la partoprenantoj de la UK. La du paralelaj kursoj – kiuj okazos dufoje tage dum kvar tagoj de la UK-semajno, do entute ok fojojn – estas celataj por komencantaj (A1, A2) kaj meznivelaj (B1, B2) parolantoj de la internacia lingvo. Ankaŭ observantoj de la instrulaboro estas bonvenaj. La kursmaterialo por komencantoj estas la eldonaĵo *Poŝamiko* (5 EUR); en la alia nivelo oni estos petata kontribui al la kopikostoj. Antaŭa aliĝo ne estas bezonata. La programojn gvidos la konataj Esperanto-pedagogoj s-ino Katalin Kováts kaj s-ro Sylvain Lelarge.

# Kiu kongresas kiam kaj kie?

**43-a Internacia Infana Kongreseto (IIK)**, 28-a de julio – 4-a de aŭgusto 2012 en Hanojo, Vjetnamio. Informoj ĉe la TTT-ejo: http://bertosch.free.fr/iik2012 kaj ĉe la respondeculo de IIK, s-ro Bert Schumann, infana.kongreseto@gmail.com aŭ bertox@free.fr.

**45-a ILEI-Konferenco**, 20-a – 26-a de julio 2012 en Kunming, Ĉinio. La konferenca temo estas: La arto de komunikado, komunikado de artoj. Pliaj informoj, kotizoj, fotoj kaj aliĝilo troviĝas ĉe la TTT-ejo de la konferenco: http://www.ilei.info/agado/konferencoj.php.

**68-a Internacia Junulara Kongreso (IJK)**, 5-a – 11-a de aŭgusto 2012 en Hanojo, Vjetnamio. Informoj en la TTT-ejo: http://ijk-68.hanojo.org. Aliĝoj ĉe: http://ijk-68.hanojo.org/form.html. Pliaj informoj ankaŭ ĉe TEJO/IJK, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; ☎+31 10 436 1044, +31 10 436 1751; oficejo@tejo.org.

# Ĝeneralaj informoj

**Disdonado de propagandiloj kaj informiloj.** Universala Kongreso estas la plej bona okazo por informi la movadan publikon pri iu nova iniciato, pri specialaj agadoj de via faka asocio, por reklami novan eldonaĵon aŭ revuon, fari donacon al ĉiuj kongresanoj, por anonci iun renkontiĝon, kursaron, varon. La plej efika maniero estas enmeti la informilon en dokumentujon kiun ricevas ĉiu kongresano. Tiu servo estas aparte pagenda (275 eŭroj), kaj necesas peti permeson de la Estraro de UEA por disdonado (bv. kontakti la CO de UEA). Neniu dokumento rajtas esti distribuata en la kongresejo sen permeso de la Estraro.

**Salonmendoj kaj standoj (budoj).** Ĉiuj fakaj asocioj konataj al UEA ricevas mendilon por havi salonon por sia kunveno dum la UK, se ili tion bezonas. Salonmendoj devas atingi la Centran Oficejon ĝis la 31-a de marto de la kongresa jaro. Malfruajn mendojn oni traktas malprioritate kaj eblas postuli por ili ekstran lupagon. Salonon por kunveno ne povas mendi individuo (ekz. por prelego), sed nur asocioj. Se via asocio ankoraŭ ne ricevis la mendilon, bv. peti ĝin ĉe la konstanta adreso. Asocioj, movadoj, firmaoj, eldonejoj, revuoj aŭ grupoj, kiuj volas aparte efike informi kongresanojn, disdoni broŝurojn, kolekti kotizojn k.s. povas mendi budon (standon) dum la kongreso (380 eŭroj). Tiujn budojn oni ne rajtas uzi por komercaj celoj (vendado de libroj, insignoj k.s.), sed jes por kolekti mendojn.

**Kongresa Libroservo.** Universala Kongreso estas okazo ankaŭ por aktualigi vian bibliotekon, aĉetante en la plej riĉa E-vendejo de la jaro: la Kongresa

Libroservo. Multaj novaj libroj estos unuafoje lanĉitaj en la Kongresa Libroservo, en kiu plurajn titolojn eblos aĉeti ankaŭ kun speciala rabato. La Kongresa Libroservo havas ekskluzivan rajton vendi librojn kaj aliajn esperantaĵojn dum la UK. Se vi aŭ via asocio volas vendigi viajn eldonaĵojn, necesas ke vi ofertu ilin al la Libroservo de UEA (CO) minimume du monatojn antaŭ la kongreso.

**Pagmanieroj.** Estas diversaj kontoj kaj manieroj per kiuj oni povas pagi siajn kongresajn mendojn. Elektu tiun kiu estas por vi la plej oportuna kaj plej malkara. Tamen bv. noti ke la plej sekura kaj rapida vojo estas poŝta aŭ banka monĝiro. Se vi mendas proksime al la limdatoj, bv. ankaŭ noti ke pagoj al poŝtaj kontoj ekster Nederlando (Germanio, Svedio k.s.) povas foje daŭri eĉ unu monaton. Nepre konsideru malfermon de konstanta konto ĉe UEA, ĉar tio havas plurajn avantaĝojn. Bonvolu ĉiam sendi pagojn kaj rilatajn mendilojn al la sama instanco. Kotizojn kaj donacojn al la bonfaraj kasoj oni prefere pagu al la landa peranto (vidu la liston de la oficialaj perantoj sur la interna dorskovrilo).

Pagojn por loĝigo, ekskursoj kaj bankedo faru rekte al Universala Kongreso de Esperanto en unu el la jenaj manieroj:

– poŝta ĝirkonto: nederlanda konto 62 73 37 je la nomo de Universala Kongreso de Esperanto en Rotterdam. IBAN-numero: NL48PSTB0000627337, SWIFT (BIC)-kodo: PSTBNL21.

– banko: per banka ĝiro al konto 42.69.01.444 je la nomo de Universala Kongreso de Esperanto ĉe ABN-AmRo Bank, Rotterdam. IBAN-numero: NL86ABNA0426901444. SWIFT (BIC)-kodo: ABNANL2A.

– UEA-konto: personoj kun sufiĉa bonhavo ĉe UEA povas sendi mendilojn kaj peti debeton al sia persona konto.

– monbiletoj: oni povas sendi monbiletojn (en eŭroj aŭ valuto ŝanĝebla al eŭroj) al la konstanta adreso, prefere en registrita koverto.

– al la poŝtokonto en la nomo de Universala Esperanto-Asocio en Belgio: 000-1631831-97 / Germanio: Köln 3182.91.509 BLZ 370 100 50 / Svedio: 74374-0 / Svislando: Bulle 12-2310-0.

Pagante per banka ĝiro al Nederlando de ekster Eŭropa Unio, nepre aldonu 10 eŭrojn por la bankkostoj.

Se vi pagos per banka ĉeko, sendu ĝin al la konstanta adreso. La ĉeko estu en eŭroj kaj nepre aldonu 25 eŭrojn por la bankkostoj. Prefere ne sendu ĉekojn kiuj ne estas titolitaj al unu el la bankoj en Nederlando. Kostoj por ili povas esti tre altaj. Ne forgesu ĉiam klare indiki la celon de via pago.

**Kreditkartoj.** Eblas pagi ankaŭ per kreditkartoj Visa, Mastercard kaj American Express, indikante la numeron de la karto, la daton ĝis kiam ĝi validas, kaj la 3-kontrolciferojn malantaŭ la kartoj (CVC-numero). En tiu kazo la pagata sumo tamen devas esti plialtigita per 5% pro administraj kostoj, tiel ke por grandaj sumoj estas konsilinde uzi alian pagmanieron.

**Asekuro.** La kongreskotizo inkluzivas nenian asekuron. Necesas do, ke ĉiu aliĝinto zorgu mem pri taŭga asekuro ekz. kontraŭ akcidento kaj malsano dum la kongreso. La kongreso ne repagas mendojn (ekz. por loĝado, ekskursoj, bankedo), se la malmendo venas post la difinita limdato. Ĉar temas pri relative grandaj monsumoj, estas konsilinde asekuri sin kontraŭ eventuala nepartopreno. Pri tio konsultu vian kutiman asekuriston.

**Donacoj.** La kongreso bonvenigas donacojn por la ĉi-subaj celoj:
– Adoptaj Gepatroj: subvencias partoprenon en la Internacia Infana Kongreseto de infanoj el landoj kun transpagaj problemoj.
– Fondaĵo Canuto: helpas membrigon al UEA de esperantistoj el landoj kun transpagaj problemoj.
– Triamonda Kaso: helpas al kongresanoj el triamondaj landoj.
– Blindula Kaso: helpas al blindaj kongresanoj.
– Volontula Fondaĵo: subtenas volontulan servon ĉe la Centra Oficejo.
– Ĝenerala Kaso: por la ĝenerala subteno al la organizado de la UK. Mencio pri ĉiu donacinto aperos en la Kongresa Libro kaj en la revuo *Esperanto*.

# Kontaktinformoj

**Centra Oficejo de UEA, Kongresa Administracio:** Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; ☎ +31 (0)10 436 1044, 🖷 +31 (0)10 436 1751; 💻 kongresoj@co.uea.org. N.B. Pri ĉiuj aferoj bv. korespondi nur kun la CO kaj neniam skribi al LKK. LKK-anoj ne povas trakti individuajn petojn kaj leterojn kaj ne respondos ilin.

# Kongresaj perantoj

Se estas en via lando, prefere sendu viajn mendilon kaj pagon al la peranto. Se ne, sendu la mendilon kaj pagon al Roterdamo. Mendojn sen pago oni ne traktos.

**Aŭstralio:** Libroservo de Australia E-Asocio, 4/23 Albuera St, Battery Point TAS 7004
**Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg
**Belgio:** Claude Glady, 1 rue du Culot, 5630 Cerfontaine *aŭ* Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
**Britio:** Esperanto-Asocio de Britio, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE
**Ĉeĥio:** Petro Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice
**Ĉinio:** Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 825, 100037 Beijing
**Danio:** Arne Casper-Mortensen, Bryggervangen 70, 4.tv., 2100 København
**Estonio:** Ahto Siimson, Ept 12-11 Paikuse, 86602 Pärnu Maakond
**Finnlando:** Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki
**Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris
**Germanio:** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz
**Grekio:** Helena Esperanto-Asocio, Aristidu 9, 105 59 Athina
**Hispanio:** Pedro A. Garrote Escribano, C/Las Mercedes, 5-5º-C, 47006 Valladolid *aŭ* Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, 08200 Sabadell
**Hungario:** Hungaria Esperanto-Asocio, Bródy Sándor u. 38, fszt. 3, 1088 Budapest
**Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, 101 Reykjavík
**Israelo:** Jehoŝua Tilleman, 97-a Dereĥ-Akko, 26373 Kirjat-Mockin
**Italio:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, 20143 Milano
**Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, 162-0042 Tôkyô
**Kanado:** Olga Du Temple, 765 Braemar Avenue, North Saarnich, BC V8L 5G5
**Korea Resp.:** Korea Esperanto-Asocio, 1601 Kangbyon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-gu, Seoul, 121-703
**Kroatio:** Boris Di Costanzo, set. Carmen Sylve 19, 51410 Opatija
**Latvio:** Margarita Želve, Rūpniecības iela 35-13, Rīga 1045
**Litovio:** Litova Esperanto-Asocio, ab.k. 167, 44002 Kaunas C
**Nederlando:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam
**Norvegio:** Agnar Fitjar, Wiers Jenssens vei 33A, 5089 Bergen
**Nov-Zelando:** David Dewar, 28 Coventry Way, Long Bay, Auckland 0630
**Pollando:** Jan Skonieczka, ul. Chłodna 23ª, 85-345 Bydgoszcz
**Rusio:** Miĥail Ĉertilov, Titova 6-24, 606211 Liskovo *aŭ* Halina Gorecka, ab.ja. 1205, 236039 Kaliningrad
**Serbio:** Milica Ristić-Dokmanović, Bul. Oslobodjenja 29/II, 11000 Beograd
**Slovakio:** Lúbomír Fajth, Plevník 105, 018 26 Plevník
**Svedio:** Leif Holmund, Kågevägen 40 B, LGH 1303, 931 38 Skellefteå
**Svislando:** Poŝtĉekkonto 12-2310-0 je la nomo "Universala Esperanto-Asocio"
**Usono:** Esperanto-USA, 1500 Park Av #134, Emeryville CA 94608
**Vjetnamio:** Vjetnama Esperanto-Asocio, 105A Quan Thanh, Hanoi

# Flugante per Star Alliance vi ricevas ĝis 20% da rabato

La flugkompanioj de Star Alliance estas kontentaj esti la oficiala flugkompania reto por la 97-a Universala Kongreso de Esperanto.

Por ricevi la rabaton de la Star Alliance Convention Plus-programo, kaj por informoj pri la rezervoficejoj kaj ceteraj reguloj, bv. iri al www.staralliance.com/en/business-solutions/conventions-plus/delegates kaj:

1. elekti vian preferatan lingvon ĉe la supra dekstra angulo;
2. ĉe "Delegates Login" skribu la eventan kodon **TG06S12**;
3. elekti unu el la partoprenantaj flugkompanioj listigitaj;
4. elekti vian preferatan rezervoficejon kaj sciigi la eventan kodon **TG06S12** kiam vi rezervas vian flugbileton.

Aliĝintaj kongresanoj plus unu akompananto kune vojaĝantaj al la UK povas kvalifikiĝi por ricevi la rabaton, depende de la tarifo kaj klaso rezervita, ĉu komerca (business) ĉu ekonomia (economy).

En la retejo de Star Alliance estas la listo de la partoprenantaj flugkompanioj el la alianco en tiu ĉi oferto.

La rabatoj ne validas por, i.a. la jenaj specialaj tarifoj: ĉe retpaĝo/Interreto, por junuloj kaj maljunuloj, grupaj kaj Ĉirkaŭ la Mondo-biletoj.

Kiam vi rezervos la flugojn, bv. montri konfirmilon de via kongresaniĝo.

STAR ALLIANCE™
Kiel la Mondo konektiĝas.

ADRIA
AEGEAN
AIR CANADA
AIR CHINA
AIR NEW ZEALAND
ANA
ASIANA AIRLINES
Austrian
Blue1
British Midland International bmi
brussels airlines
CROATIA AIRLINES
EGYPTAIR
Ethiopian
LOT POLISH AIRLINES
Lufthansa
SAS Scandinavian Airlines
SINGAPORE AIRLINES
SOUTH AFRICAN AIRWAYS
Spanair
SWISS
TAM
TAP PORTUGAL
THAI
TURKISH AIRLINES
UNITED
US AIRWAYS